

# Pola

Nro 12

# Esperantisto

XXX

DECEMBRO

JARO

1936

Esperantysta  
Polski

---

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO  
REDAKTANTOJ PROF. DR ODO BUJWID — MGR TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZY

---

APERAS LA 1-a DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI GIS LA 20-a DE  
CIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LAŬ BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

---

## LANDAJ NUMEROJ DE FAKAJ GAZETOJ

En Esp. ekzistas jam diversaj fakaj gazetoj kiel ekz.: poŝt-telegrafista, nedaĝogia, medicina, scienca, gejunulara, skolta, vegetara k.t.p. Kvankam de tempo al tempo aperadas en ili sciigoj pri tiuj ĉi fakoj en diversaj landoj, estus tamen bone, se oni povus iufoje aperigi ankaŭ landajn numerojn fakajn. Tio signifas, ke la tuta numero estus plenigita nur per materialo de iu sola lando pri iu certa fako. Tia numero donus pli kompletan pririgardon pri iu certa fako en iu aparta lando. Al kunlaborantoj de nacilingvaj samfakaj gazetoj tia numero estus bona fonto pri diversaj informoj rilate respektivan fakon. Tiel, per tiaj numeroj oni donos al Esp. praktikajn servojn. Nun oni uzas Esp. plejparte por pritrakti lingvajn demandojn, organizadon de Esp-istoj, propagandajn aferojn kaj beletristan literaturon. Sed, se Esp. sin okupos nur pri tiuj ĉi aferoj, ĝi neniam fariĝos vere internacia lingvo. Internacia lingvo estas unuavice necesa por praktika vivo, t. e., por ĉiaspecaj fakoj. Tial estas nia devo klopodi, ke Esp. estu ekuzata por tiu ĉi celo. Landajn numerojn de fakaj gazetoj oni povas aranĝi kaj eldoni kiam ajn, sed re-

cipe bona okazo por tio estas ia historia dato rilate iun fakon en iu certa lando. Same tre bonan okazon por tio prezentas tutmonda Esp. kongreso. La lando, kie okazas tia kongreso, devus laŭeble klopodi precipe en tiu jaro por junĝi Esperanton al praktikaj servoj, kio do ankaŭ estos landaj numeroj de fakaj gazetoj. Tion oni do povus atenci de Polujo en 1937. Kaj oni devus ĉi aferon pripensi laŭeble baldaŭ, ĉar kolektado de materialo, aranĝado, tradukado k.t.p. bezonas sufiĉe multe da tempo.

Por tiaj landaj numeroj oni devas klopodi ricevi ankaŭ materialan subtenon ĉu de tiurilataj organizaĵoj aŭ administracioj. Eble ili donos tial, ke per tiu ĉi afero oni konatigas ja al la mondo la vivon de tiu ĉi lando. Se oni ne ricevas subtenon, do almenaŭ oni eble povas por tia numero facile ricevi necesajn informojn de kompetentuloj kaj aŭtoritatoj, same ankaŭ kliŝojn.

Do, ĉu ni povas en 1937 esperi volaĵi numerojn de tiuj ĉi suprenotitaj Esp. fakaj gazetoj?

J. Vahtra, Tallinn.

## ESPERANTO EN LA LERNEJON!

Jam en la unua epoko de nia movado la propagandistoj konsideris la enkondukon de Esperanto en la lernejojn kiel unu el la ĉefaj de sia agado. Fakte tio estas la ĉefa celo de la propagando, ĉar se ĉiuj homoj konatiĝus kun Esperanto, estas nedubeble, ke ili enkondukus ĝin pro sia propra intereso en siaj internaciaj rilatoj, ĉu privataj kaj rapide nia lingvo fariĝus la ĉefa lingvo de la internacia komerco, radio, filmo ktp.

Bedaŭrinde tiu malnova sopiro ankoraŭ ne estas realigita! Post kelkaj jardekoj de sindona propagandado, la Esperantistaro sendube atingis sennombrajn sukcesojn sur diversaj kampoj. Ankaŭ en la lernejoj la fervora agado de niaj instruistoj-samideanoj ne restis senfrukta. Multloke jam okazis kaj okazas libervolaj kursoj por la ĝelernantoj, sed decidan sukceson sur tiu kampo oni ankoraŭ ne rikoltis. Tio ne estas miriga, ĉar sukceson ne povas havigi unuopaj izolaj klopodoj, eĉ se faritaj de la plej sinofera fervorulo, — por atingi grandsignifan sukceson oni devas agi laŭ sistema plano kaj tian povas realigi ne unuopuloj, sed nur celkonscia asocio.

En la postmilitaj jaroj fondiĝis TAGE, la „Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj” kiu celas kolekti ĉiujn Esperantistajn instruistojn por propagandi efike la enkondukon de nia lingvo en la lernejon. Malgraŭ la fervora agado de tiu asocio, ĝi ankoraŭ ne sukcesis realigi eĉ la unuan parton de sia tasko, t. e. kolekti la jam esperantiĝintajn instruistojn en apartan asocion por komune agadi por komuna celo. Estas certe, ke Esperanton lernis, precipe lastatempe, granda nombro de instruistoj, el kiuj multaj fervore agadas por nia idealo. Sed estas vere ankaŭ, ke multaj el ili eĉ ne scias pri la ekzisto de TAGE, pri la utilo, kiun ĝi ankaŭ al ili persone povas havigi kaj tial ne aliĝas, ne alportas sian bezonatan kunlaboron, kaj la Asocio ne povas entrepreni grandskalan agadon, ne povas prepari efikan sukceson.

Alia estus la stato de la afero, se la laborema komitato de TAGE povus kalkuli je apogo kaj daŭra kunlaboro de la geinstruistoj, kies bruston ornamas la verda stelo.

Mi volas atentigi per ĉi tiu artikolo la instruistojn kaj instruistinojn pri la graveco de tiu asocio, sub kies neŭtrala

tegmento estas loko por ili ĉiuj, sendepende de ilia persona politika konvinko aŭ religia kredo. La anoj de TAGE kunlaboras por disvastigi la uzadon de Esperanto ĉe instruistoj kaj ĝelernantoj ĉiulandaj, ili interrilatiĝas kun alilandaj gekolegoj, propagandas ĝenerale nian ideon en instruistaj rondoj por tie kreskigi la interesiĝon, kio estas premiso por la celo: la enkonduko de Esperanto en la lernejon.

Niaj instruistaj samideanoj povus esti enviindaj! Ili ja posedas jam taŭgan internacian fakan organizaĵon, kiu eldonas jam de 15 jaroj „I. P. R.” (Internacia Pedagogia Revuo). Dependas nur de ili plifortigi tiun asocion, kunlabori al la revuo, por ke ĝi fariĝu perfekta interkontaktilo por diverslandanoj, ĉar tia internacia pedagogia revuo povus kompreneble larĝigi la fakan horizonton pli ol nacia revuo.

Kial ili ne faras tion? Kiuj povas esti la kaŭzoj? En la nuntempaj krizaj cirkonstancoj oni emas pensi pri tiu neŝatata spektro kiu timigas ĉiun pene ekvilibritan budĝeton: nova kotizo post tiom da aliaj! Sed mi ne kredas ke en nia kazo tio estas la ĉefa kaŭzo! La kotizo ne estas alta, sobra samideano certe povos enbudĝetigi ĝin sen vivdanĝero! La ĉefa kaŭzo verŝajne estas la simpla fakto ke oni ne konas TAGE kaj ĝian revuon! Alie multe pli multaj geinstruistoj aliĝus, sentante ke por ili la tutmonda solidareco ne plu estos utopio, se ili povas senti sin jam hodiaŭ en amikaj kontakto kun kolegoj alilandaj. Tio ja donos al ili plian kuraĝon por la ĝenerala poresperanta agado, sed ankaŭ personan ĝuon kaj multan instruon utiligeblan en la profesia laboro. Vidante kion aliaj kolegoj sukcesas en sia lernejo, en sia landa faka gazetaro, ĉe siaj naciaj fakorganizaĵoj rilate al nia propagando, vi ankaŭ plikuraĝiĝos, imitos kaj ankaŭ sukcesos!

Fariĝu do ano de tiu asocio, fariĝu kunlaboranto de la I. P. R.! TAGE certe havas gravan rolon en la sukcesigo de nia afero! Fariĝu ĝia pioniro kaj agadu kunlabore kun viaj gekolegoj laŭ kune starigota agadplano! Tio estas la sola vojo por atingi la enkondukon de nia lingvo en la lernejojn kaj ĝisvivi la tagon kiam vi instruos al ĉiuj viaj lernantoj, en la kadro de la kutima programo,

la lingvon kiun vi amas kaj kiu ebligas al ili starigi pli hom-indajn rilatojn en la tutmonda haoso!

Leganto! Se vi estas instruist(in)o, ne de S-ro P. Korte, Schoolstraat 13, Veen-dam, Nederlando senpagan specimenon de I. P. R. kaj detalajn klarigojn pri TAGE. Tio estas via devo: almenaŭ konatiĝi kun la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj.

Kaj se vi ne estas instruisto, vi ankaŭ povas plenumi belan taskon. Montru ĉi tiun artikolon al instruisto el via urbo aŭ vilaĝo, demandu lin, ĉu li scias pri la ekzisto de TAGE kaj instigu lin konatiĝi kun ĝi en sia propra intereso kaj en la intereso de nia movado, kies venko ne estas imagebla sen la kunlaboro de la instruistaro.

Stigsmundo Pragano.

## AL LA AMIKOJ DE LA HUMANECO KAJ PACO EN LA TUTA MONDO

Represo kaj traduko dezirataj, kondiĉe ke oni sendu 2 pruvekzemplerojn al la Centra oficejo de „Harand-movado”, Wien, I., Elisabethstrasse 20. Aŭstrio.

(Fino)

Ni rekonsciiĝu! Ni ne lasu nian sorton komplete al homoj, kiuj devas esti nur niaj reprezentantoj, sed kiuj misuzas kaj fleksas nian mandaton, ĉar ni tro malmulte zorgas pri niaj propraj aferoj. La gvidantoj de la mond-aferoj montriĝis malkapablaj. Ve al ni, se ni plue restos nur rigardantoj! La mondo ne estas teatro. La viroj, kiuj sur la scenco de la mondpolitiko montras siajn talentojn, estas ĉarpentistoj de nia sorto kaj de la estonteco de nia familioj. Nia profesio certigas al ni nur la trankviligon de la senperaj vivnecesaĵoj. Sed ĝi ne certigas nian estontecon, se ni ne rezervas al ni tempon, por okupi nin ankaŭ per la politiko, kiun lertaj demagogoj sukcesis kompromiti, por ke la popolo sin tute al ili elliveru. Ni devas komenci observi la politikon, ĉar montriĝis, ke la homoj, kiuj ĝis nun sin okupis per la administrado de publikaj aferoj, per la formado de nia mondo, per la regulado de la interrilatoj inter ŝtatoj kaj homoj, per la fabrikado kaj distribuado de bonoj, estis malbonaj mandatuloj. Ĉar aliokaze ne estus eble, ke ni en la dudeka jarcento ankoraŭ devas esti maltrankvilaj pri la paco kaj devas vidi, kiel nutraĵoj kaj krudmaterialoj estas detruataj, dum milionoj da homoj mortas pro malsato kaj sin memmortigas pro mizero. Aliokaze ne estus eble, ke oni nun ankoraŭ devus sensukcese batali por la asekuro de maljunaj homoj.

Ĉiu devas kunagi! Estus nepardoneble por ni, se ni senage rigardus, kiel la diplomato A aŭ la politikisto B per mallertaj paroladoj kaj faroj ekŝanceligas la mondon, pligrandigas la militdanĝeron kaj kondukas la homaron al la abismo. Ni devas observi la fingrojn de niaj mandatuloj. Mi ne plu volas porti respondecon kaj resti senaga. Mi volas kontribui mian parton je ĝenerala savagado, kiun oni devas entrepreni, por certigi la pacon kaj fine alporti al la homaro la bonstaton kaj la vivfeliĉon, por kio ekzistas ĉiuj premisoj.

Por tiu ĉi celo, mi instigis la asocion, kiun mi gvidas t. e. la mondorganizon kontraŭ rasa malamo kaj homa mizero, kies nomo estas „Harand-movado”, ke ĝi kunvoku por la dua parto de aŭgusto 1937 al Wien mondkongreson kontraŭ milito, malamo kaj mizero. Ĉiu homo, kiu estas kapabla entuziasmiĝi kaj posedas taŭgecon esti gvidanto de homamasoj, bonvolu decidiĝi transpreni la oficon de delegito. Li akiras la rajton partopreni en la kongreso, se li estos elektita de mil samlandanoj. Devas esti konstruata aparato, kies misio estus, kunvibri, kunsvingiĝi kaj voki, ĉiam, kiam ie en la mondo estas malatentataj kaj tretataj per piedoj la principoj de la justeco kontraŭ homoj, religioj, rasoj kaj popoloj. Mi atentigas pri la rasa leĝaro de la Tria Regno, kiu estas pugnobato en la vizaĝon de la kultura homaro. Mi atentigas pri la sangon soifanta „juĝisto Lynch”, kies verdiktoj ne estus konformaj eĉ al la etiko de la ĝangalo. Mi atentigas pri malatento de homaj rajtoj, pri perforto, teroro, malamo kaj senhonorigo de la idealo de justeco — teruraj karakterizaj ecoj de nia bedaŭrinda jarcento. Mi atentigas pri la

teruron vekantaj okazaĵoj en Hispanujo. Kiam kaj kie tio okazas, la konstruota aparato devus ekfunkcii, por alporti rebonigon kaj savi la honoron de la homaro.

Ankaŭ mi ĝis antaŭ kelkaj jaroj ne okupiĝis pri politiko. Malgraŭ tio mi sukcesis, en relative mallonga tempo en preskaŭ ĉiuj plej gravaj ŝtatoj de la mondo kolekti homamasojn. Kiu vidas la nuboplenan nuntempon kaj volas forigi la proksimiĝantan malfeliĉon, havas ne nur la rajton, sed eĉ la devon, tuj sin anonci. Ĉiu delegito devus jam nun komenci la laboron, ĉar ni volas la tempon, kiu estas je nia dispono, uzi por interkonsiliĝo pri la vojoj, kiujn ni devas iri, por ataki la militon, la malammon kaj la mizeron. Kiu sin anoncos, povas havi nian helpon ĉe la kolekto de la voĉoj kaj plenumo de sia funkcio. Ĉiu delegito tiamaniere povus en sia hejmlando krei popolan movadon.

## EL LA AŬSTRALIA LITERATURO.

### *Joda Tinkuro*

de Charles S. Gilmour

Mi naĝis reen en konscion tra maro da inkubaj sonĝoj kaj malfermis la okulojn antaŭ ĉielo, kies brilegeco igis ilin dolori. Mi tuj fermis ilin kaj komencis pensi, ĉar malgraŭ ke mia menso strange maltrankviliĝis, mia memoro estis klara. Tiun matenon, aŭ, povis esti, la antaŭan tagon, ni bajonete atakis la turkajn tranĉeojn.

Mi rememoris ke mi stumbladis sur malebena tero, falis du fojojn kaj relevis min, peze kuris kun kamaradaj figuroj dekstre — maldekstre. Tiam subite mi troviĝis en infero de l' bruo, kaj, dum glitis en mian koron malvarma sento de teruro, mi suferis akran ŝokon kaj jen... nigreco.

La Turkoj estis min paftrafintaj, kaj mi demandis min pri la sorto de la kunbatalintoj: ĉu ankoraŭ ili vivas? Mi ne sentis malsaton aŭ soifon, ne konsciis doloron. Sed mi scivolis: ĉu mi grave vundiĝis, kaj penis levi la kapon. Tion mi ne povis; mi nur sukcesis turni ĝin flanken, kaj denove malfermis la okulojn. Proksimume futon for de mi kuŝis alia homo, juna oficiro, evidente grave trafita. Li movis la kapon, kaj ĝemis.

Inter ni, apud mia kubuto, kuŝis familiara objekto, malgranda botelo da joda

kiu enfluus en la grandan riveron de la amo al la proksimuloj, paco kaj justeco, kion la kongreso devus enkorpiĝi. Estas sensencaĵo aserti, ke ekzistas neniu rimedo por certigi la honstaton kaj vivfeliĉon al ĉiuj homoj sur la tero. Ekzistas vojo, se oni havas la honestan volon serĉi ĝin.

Homfratoj! Anoj de ĉiuj landoj, rasoj kaj lingvoj! Anoncu vin, se la sorto, la vivo kaj estonteco de viaj infanoj estas al vi karaj! Anoncu vin, ankoraŭ antaŭ ol la kanonoj parolos, anoncu vin, ankoraŭ antaŭ ol el nia belega mondo fariĝos teruroplena amaso da ruinoj!

Irena Harand.

Informojn pri la mondkongreso donas en ĉiuj lingvoj, ankaŭ en Esperanto, la kongres-oficejo de la „Harand-movado”, Wien, I., Elisabethstrasse 20, II-a etaĝo. Aŭstrio.

tinkuro, el la kampa hospitalo. Je la vido mi ekpensis pri konsilo de trupŝipa kuracisto: en okazo de vundiĝo, uzu ĝin sen prokrasto. Mi penis etendi la manon al la boteleto, sed sentis min nekapabla movi la brakon. Estas ja terure, havi la volon movi membron, sed malhavi la povon.

La boteleto da tinkuro, tiele proksima, turmentegis miajn pensojn. La juna oficiro, kiu kuŝis tie, tordata de doloro kaj soifo, kriis obtuze je akvo, sed min okupis nenio ekster la pasia deziro tuŝkapti la botelon per miaj fingroj. Mi kredis, ke se mi povus tion, ĉio estus bona ĉe mi; mi tial baraktis penante levi la manon. Sed ondo de vomemo tiris min en abismon, kaj mi denove falis en senkonsciecon.

Kiam mi vekigis, estis saĝe posttagmeze, kaj mi sentis iom da iritanta doloro en la kapo. Mi trovis, tamen, ke mi povis levi ĝin ĝis gradeto, malfermis la okulojn kaj turnrigardis. La homo sternita apud mi jam kuŝis sur la flanko; liaj okuloj sin fiksis sur la boteleto, al kiu lia mano malrapide almoviĝis.

„Tio estas mia”, mi raŭkis. Li rigardis min kaj ridetis malforte. Mi vidis

lian manon, kun la fingroj disetenditaj, limake aliranta la botelon.

„Damnu vin”, mi sakris. „Tio estas mia”.

Mi ree kaj ree baraktis por moviĝi kaj preskaŭ svenis denove, kiam mi sentis la dekstran brakon iom rektiĝi. Do nun stariĝis konkurso inter ni, oficiro kaj simpla soldato, ambaŭ grave vunditaj, por atingi la etan botelon, kiu, en niaj febraj mensoj, posedis tiel grandegan signifon. La kupre-brula suno sekompate fajris sur nin.

Estas al mi nun indiferente, ĉu mi vivos aŭ mortos, sed mi nepre devas havi tiun jodajon por verŝi sur miajn vundojn. Mi tord-perfortis la kapon kiom mi nur povis kaj okulmanĝis lin kun malamo kaj jaluzo, furioze penegante atingi la botelon per mia rampetanta mano, kiu antaŭeniĝis per ĉiu ekpuŝo onon daŭ colo.

Sed mia rivalo jam estis pli apuda al ĝi ol mi, kaj malgraŭ alternaj ondoj de kapturigo kaj nigro, mi freneze pliluktis, senmova krom la izolaj agitoj de mia mano. Ankoraŭ rigardegante mian konkuranton, mi supozis ankaŭ lin preskaŭ svenanta; sed io simila al triumfo

brilis en liaj okuloj, kiam ili renkontis la miajn.

Pluen rampis lia mano pli rapide ol mia povis, ĝis ĝi alproksimiĝis je duoncolo al la botelo. Mi nun sciis, ke neniam mi posedos la tinkturon, kaj mi ploris amarhumore pro ĉagreno.

Sed nenia triumfo brilis nun en la griza vizaĝo, kiu estis tiel proksima al la mia, kaj mi denove rigardis liajn tenemajn fingrojn, nun preskaŭ ekprenontajn la botelon. Unu momenton mia spirito ĝoje eksaltis, ĉar mi kredis, ke li finfine ne povos atingi ĝin; tiam, fiksrigardante min, li per siaj fingroj ĉirkaŭprenis ĝin.

Mi gapis, malamegante lin ekster ĉia imago; tiam, kun konvulsia kolekto de fortoj, li puŝis la botelon en mian manon.

Ses semajnojn poste mi rekonsciiĝis en Londona hospitalo. Sed mi neniam plu vidis la oficiron. Eble li mortis tie, ĉe Lone Pine (1).

**Tradukis R. Banham.**

(1) Lone Pine, sur Duoninsulo Gallipoli. Tombejo de multaj, multaj aŭstraliaj soldatoj.

## JE MEMORO DE HENRYK SIENKIEWICZ

Antaŭ dudek jaroj, la 16-an de novembro 1916 j. perdiĝis Polujo unu el siaj plej bonaj filoj, kiu kreis konvenan spiritan atmosferon, en kiu povis reviviĝi la juna Respubliko. La sortobato estis des pli dolora, ke en la unuaj jaroj de la renaskiĝinta regno ofte mankis tiel fortaj geniuloj, kiuj povus konforme influi la animon de la popolo.

Silentiĝis por eterne la koro, en kiu regis nur nun sento: amo al Patrujo. En la momento, kiam la konkerintoj jam preskaŭ sukcesis malnobligi la polan animon, ekbrilis per fajro de siaj vortoj Henryk Sienkiewicz, kaj per nobelula glavo fraptuŝis la nacian honoron.

Henryk Sienkiewicz estis por la pola nacio ne nur genia verkisto kaj poeto. Li ludis preskaŭ historian rolon, kreinte spiritan atmosferon meze de la pola nacio, kiun liaj nobelaj romanoj inspiris al heroaĵoj sur kampoj de sangaj bataloj por akiri la sendependecon.

Jam liaj unuaj, koncerne al amplekso malgrandaj, literaturaĵoj estas filigrana studo de la homa animo, kaj speciale de la pola animo. Sienkiewicz ne deziras

popularecon, ne deziras pere de flatado al la legantoj akiri ilian favoron. Ne estas tasko de vere nacia verkisto krei per forviŝado de mankoj kaj eraroj difektitan bildon de nacia animo. Genia verkisto devas senti sian devon kiel edukisto de la socio, kaj devas pli ĝuste substreki tiujn malvirtojn kaj mankojn, montrante samtempe la vojojn al korektado. Sienkiewicz tiun sian rolon jam en la komenco de sia artistika kreado elektis kiel dominantan.

Vera tragedieco kuŝas en la fakto, ke ne estis donite al Henryk Sienkiewicz, same kiel al multaj aliaj Poloj, kiuj helpis al rekonstruado de la Respubliko, ĝisatendi la momenton, kiam la Aglo Blanka ekestis el cindroj kaj etendis siajn potencajn flugilojn super la liberigita Patrujo.

Henryk Sienkiewicz agis ne nur sur limigita tereno de literaturo. Kvankam kelkaj liaj verkoj estas tiel specife polaj, ke fremdulo nur malfacile povas enpenetri en ĉiujn detalojn, kaj la lingva riĉeco de Sienkiewicz ne videbliĝas tiel forte en la tradukoj, malgraŭ tio, kelkaj

tradukajoj de liaj verkoj estas majstraĵoj sui generis. „Quo Vadis”, „Sen dogmo”, kaj ankaŭ tute purpola „Trilogio” disvastigis la gloron de Henryk Sienkiewicz tra la tuta terglobo kaj starigis lin en vicon de plej famaj eŭropaj verkistoj.

Henryk Sienkiewicz komencis sian literaturan karieron per etaj verketoj, kiujn tamen karakterizas lingvo vere poezia, muzika kaj profunda eksento de la psikologio kaj homa animo kaj la noveloj: „Janko muzikanto”, „Skizoj per karbo”, „El la memorlibro de instruisto el Poznań” ne estas verkoj de ankoraŭ nematura junulo, sed kreaĵoj vere poeziaj, posedantaj profundan socian fundamenton.

Ofte devis Sienkiewicz pro materialaj zorgoj, serĉi vojon al ekzistado en la ĵurnalista laboro, kvankam liaj inklinoj direktis sin speciale al verkado de romanoj. Sed ankaŭ en tiu fako restis Sienkiewicz fidela al la literatura verkado kaj liaj ĵurnalistaj laboroj estas siaspecaj majstraĵoj.

Li ne perdas la tempon, liaj ĵurnalistaj vojaĝoj servas al li por profunda studado, kaj tiu influo respeguliĝas multfoje en liaj laboroj.

Malfacile estas priskribi la agadon de Sienkiewicz en kadroj de ĵurnalista artikolo. Ĝi estas tiel diversspeca, tiel grandega, ke la priskribo plenigus tutajn volumojn. Liajn verkojn karakterizas pro-

funda instruiteco, eksterordinara laborosistemo, simpla sed belega lingvo, pitoreska stilo.

Henryk Sienkiewicz povas esti konsiderata kiel spirita kreinto de polaj Legioj, kiuj dum la lasta mondmilito sukcesis vekti per sia heroeco la admiron de la tuta mondo.

La „Trilogio”, instigante la Polojn al memfido, revivigis la glorajn tempojn de Pollando, heroajn batalojn kaj venkojn de Stefan Czarniecki, la entuziasmajn kaj oferemajn batalojn de la tuta popolo kontraŭ multoble pli grandaj armeoj.

Neniu pola libro estas tiel multe legata, kiel „la Trilogio” de Sienkiewicz. Sed li apartenas ankaŭ al la plej konataj polaj verkistoj eksterlande, kaj liaj verkoj atingis rekordan eldonnombron.

„Quo Vadis”, estis eldonita nur en Usono en 400.000 ekzempleroj kaj tradukita en 36 diversajn lingvojn. Multaj aliaj verkoj estas ne malpli famaj ol „Quo Vadis”, sed ili posedas pli nacian valoron, speciale por Poloj, dum „Quo Vadis” estas vere internacia.

Lastatempe tiu ĉi genia ĉefverko de Sienkiewicz estis eldonita de la Amsterdama Populara Esperanta Biblioteko en majstra esperanta traduko de f-ino Lidja Zamenhof.

Henryk Sienkiewicz estis la unua Pollo, kiu ricevis la Premion de Nobel.

Nusia Bertig - Dattnerowa.

DR. LEOPOLD DREHER.

## LINGVA ESPLORO

En „La Praktiko”, kiun redaktas en Hago s-ano Cseh, sub la titolo: „Lernu per la eraroj”, estas citataj eraraj frazoj trovitaj en diversaj libroj, gazetoj kaj aliaj presaĵoj. Do la sano, kion mi komencis jam antaŭe en „Pola Esperantisto” pri ĝi mem.

Manko de tempo ne permesis al mi, bedaŭrinde, daŭrigi en 1936 tiun kritikan laboradon, kiun s-ano Cseh nomas „utila servo al niaj legantoj kaj al niaj — verkistoj”.

Tamen „pli bona io ol nenio”. Tial mi trarigardos ĉi-foje laŭ hazardo elektitan numeron de „P. E.”, nome tiun de marto 1936.

„Kaj ĉi broŝureto havis lokon de apero, ne alian kiel en nia ĉefurbo”. — En ĉi tiu frazo anst. „kiel” devas esti: ol. Oni diras: same kiel, sed: alie ol, alia ol.

„Sed bedaŭrinde ni iom po iom deturnas atenton de la tuta afero”. — Ĉi tie la skribinto uzis „iom po iom”, anst. „iom post iom”. La vorteto „po” ja havas tute alian signifon.

„La kongreso ja sendube okazos, sed koncernas nur en kia formo”. — La vorto „koncernas” estas verŝajne traduko de „chodzi o to”. La ĝusta traduko devas esti: temas pri tio.

„Sanigita militisto antaŭe estis ofero de infekto”. Anst. „ofero” pli bona estas: „viktimo”.

„Tuj atakoj kaj insultoj malbone efikis sur la sanstato de la granda sciencisto”. La vorto „efiki” ne povas postuli la prepozicion „sur”. Same „influi sur” estas eraro, bedaŭrinde tre ofta ĉe niaj samideanoj. Plej bone estas uzi „al” aŭ „je”.

JARO 1936

# ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, UL. LUBICZ L. 34.

REDAKTANTOJ:

PROF. DR ODO BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

RESPONDECA REDAKTORO: DR LEON ROSENSTOCK

ADMINISTRANTO: LUDWIK KUTSCHER

### KUNLABORINTOJ:

Józef Alfus (Kraków). — Helena April (Kraków). — R. Banham (Melbourne). — L. Bastien (Paris). — Dr. Leo Belmont (Warszawa). — Dr. Rudolf Beres (Kraków). — Nusia Bertig-Dattnerowa (Kraków). — Prof. Tadeusz Biliński (Kraków). — Dr. Feliks Burdecki. — Inż. M. Chmieliński (Łódź). — Dr. A. Czubryński (Włochy). — Dr. Jerzy Dobrzycki (Kraków). — † Prof. Dr. St. Dobrzycki (Poznań). — Isaj Dratwer (Warszawa). — Dr. Leopold Dreher (Kraków). — Hilda Dresen (Tallinn). — L. Früs (Aabyhöj). — Dr. Adam Gadomski. — Henryk Gielb (Warszawa). — Prof. Dr. Walery Goetel (Kraków). — Olga Goldmanówna (Kraków). — S. Grenkamp (Paris). — † Helena Hempel (Lwów). — Ir. J. R. G. Isbrücker (Den Haag). — Ludmila Jevsejeva (Riga). — Bronisław Kuhl (Radom). — Prof. Dr. Kazimierz Wł. Kumaniecki (Kraków). — I. Lejzerowicz (Łódź). — John Lundgren. — Minuška Mantel (Lwów). — Eugeniusz Matwiejczuk (Szczakowa). — Emil Mayer (Kraków). — Dr. Jan Mędrkiewicz (Lublin). — Bogdan Miądowicz (Poznań). — Wł. Michałowski (Dąbrowa k. Grodna). — Prof. Walter Murdach (Melbourne). — Mieczysław Obarski (Warszawa). — Józef Orzech (Wejherowo). — Antoni Piarski-Woydakowski (Warszawa). — Dr. Edward Ralski. — Prof. Dr. Józef Reiss (Kraków). — Dr. Wilhem Róbin (Warszawa). — Jan van Schoor (Antwerpen). — J. Silhan (Radziechów). — Prof. Mieczysław Sygnarski (Bydgoszcz). — J. Szapiro (Białystok). — J. Szuster (Wilno). — Józef Toczyski (Lwów). — L. Totsche (Budapest). — J. Vahtra (Tallinn). — A. Weide (Hurup). — Halina Weinsteinówna (Warszawa). — Leon Wiener (Warszawa). — Edward Wiesenfeld (Warszawa). — Lidja Zamenhof (Lyon).

### REPREZENTANTOJ:

Białystok — J. Szapiro, Marsz. Piłsudskiego 33.

Katowice — Societo de Esperanto Amikoj, Wawelska 3.

Paryż — S. Grenkamp, 117. Bd. Jourdan.

Warszawa — Halina Weinstein, Leszno 99. m. 5. Konto P. K. O. 27.867.



# TABELO DE ENHAVO

	Paĝo		Paĝo
<b>1. Artikoloj originalaj:</b>			
Henryk Gielb — Invado de 500 da vikingoj al Polujo...	1	Eugeniusz Matwiejczuk — Al du-bantoj...	71
Tadeusz Biliński — Pri la pola toleremo kaj pacamo	2	Józef Toczyski — Kanto	72
Józef Orzech — Neordinara jubileo	5	L. Friis — Infankursoj	73
Dr. Leopold Dreher — Lingva esploro	9 150	Jan van Schoor — Sekreta amo	78
R. Banham — Grafo Strzelecki antaŭ 100 jaroj	11	Ludmila Jevsejeva — Venu, kara!	80
Inĝ. M. Chmieliński — S. O. S.!	15	O. Bujwid — La Jubilea Kongreso-interpaciĝa festo	83
Dr. Antoni Czubyński — La limoj de nia propagando	16	L. K. K. — Ĝis revido en Varsovio dum la Jubilea XXIX. Kongreso de Esperanto en 1937 jaro	84
Suvalkano — Kritiko de kritiko	18	— Polujo — pitoreska lando	88
Hilda Dresen — Vintro	18	— Kraków iama reĝa ĉefurbo de Polujo	89
R. Banham — Melburna viro, kiu persone konis Hans Christian Andersen	19	Dr. Leopold Dreher — Pri -ata kaj -ita	103. 132
Hilda Dresen — Neĝeroj	20	Napoleono — Amaraj prikongresaj penseroj	104
A. Weide — Danlando - la paradizo en la nordo	23	Wł. Michałowski — Esperanto kaj stenografio	106
J. Szuster — Ni ĉimitu aliajn!	27	S. Grenkamp — 25-jara doresperanta agado de s-ro Sapiro	107
Prof. Dr. O. Bujwid — Pasteur, Lister kaj Koch kreintoj de la nova medicina scienco	28	L. Belmont — Pri „Rimportretoj”	107
Inĝ. M. Chmieliński — Al lingva esploro	30	Halina Weinstein — Kiel estis en Kraków dum nia VII-a Kongreso	108
Inĝ. M. Chmieliński — Konsilo por kursgvidantoj	30	Dr. Jan Mędrkiewicz — Protesto	110
Józef Orzech — „Mi scipovas”	31	Isai Dratwer — Reveno	111
Inĝ. M. Chmieliński — Ni komencas...	34	L. Bastien — Respondo al la artikolo „Protesto”	114
Olga Goldmanówna — Impresoj el ekskurso al la dezerto en Afriko	37	Lidia Zamenhof — La situacio	115
I. Lejzerowicz — Reflektoj	41	Natanela — Nia steleto	116
Eugeniusz Matwiejczuk — Iom da pacienco...	42	L. Totsche — Jubileo de Baghy kaj Kalocsay	117
— Sur poŝtkarto	44. 60	Dr. Leopold Dreher — Laborprogramo de PED por 1936-1937	119
Dr. L. Dreher — Antaŭ la Tutpolanda	44	Edward Wiesensfeld — 25-jaroj de Esperanto	120
Józef Toczyski — Venas printempo	50	Nusia Bertig-Dattnerowa — Solena jubileo okaze de dekjara labora agado de silezia Vojevodro Dro Michał Grażyński	121
Dr. Leopold Dreher — Ĉiuj al Kraków!	54	Józef Toczyski — Esperanca Gramatiko	122
Inĝ. M. Chmieliński — Meditadoj de samideano	56	Jan van Schoor — Albumpaĝo	123
Isaj Dratwer — Sur la margenoj...	57	I. Dratwer — Silento	124
I. Lejzerowicz — Al Jakobo Sapiro	59	Ludmila Jevsejeva — Kial?	128
F. K. — Jakobo Sapiro (Joŝo) 1911-1936	60	Ir. J. R. G. Isbrücker — Ni faru finon...!	129
Józef Toczyski — Esperanto en „Gaja Ivova ondo”	61	Dr. Jan Mędrkiewicz — La ŝiprompiĝo	130
I. Dratwer — Epizodo	65	Nusia Bertig-Dattnerowa — Ĉefarmeestro Edward Śmigły-Rydz — Marŝalo de Polujo	133
J. Silhan — Ni kreu helparmeon!	69		
Prof. Sygnarski — Krynica - la plej ĉarma kaj fontriĉa kuracloko en Polujo	70		



	Paĝo
— Jubileo Andreo Cseh . . . . .	134
— Johano III. Sobieski — Pola reĝo . . . . .	135
La Redakcio — † Helena Hempel . . . . .	138
† Helena Hempel — En la albumon de F-ino Emilia E. . . . .	138
Irena Harand — Al la amikoj de la humaneco kaj paco en la tuta mondo . . . . .	139. 147
— Esperanto kaj Bellamy . . . . .	141
— Pola Vespero en Budapeŝto . . . . .	141
J. Vahtra — Landaj numeroj de fakaj gazetoj . . . . .	145
Sigismundo Pragano — Esperanto en la lernejon! . . . . .	146
Nusia Bertig - Dattnerowa — Je memoro de Henryk Sienkiewicz . . . . .	149
Minuŝka Mantel — Ha, ha! Pro la amo! . . . . .	151
Henryk Gielb — Nordaj landoj kaj popoloj (fragmento) . . . . .	153

## 2. Tradukoj:

Prof. Dr. St. Dobrzycki — Pri kolendoj (tr. Bogdan Miadowicz) . . . . .	4
M. Selim — Ĉu mi havas la honoron kun fraŭlino...? (tr. Leono Vianano) . . . . .	7
Hieronim Derdowski — De moŝt Ĉorlinski al Puck pro reĝoj vojaĝo (tr. J. Orzech) . . . . .	19. 31
Mieczysław Obarski — La nova organizo en la transendado de komunikoj de la PAT-centroj en Varsovio al la provinca gazetaro (tr. Henryk Gielb) . . . . .	44
Sergej Jesenin — Letero al la patriino (tr. Hilda Dresen) . . . . .	66
Prof. Walter Murdoch — La ĝusta maniero legi libron (tr. R. Banham) . . . . .	74
— Pensoj de Lafcadio Hearn (tr. R. Banham) . . . . .	76
Letta Rudnicka Jaroszyńska — La lastaj tagoj de carismo en sudruslando (tr. John Lundgren) . . . . .	76
Eliza Orzeszkowa — Sinjorino Upuno (tr. Józef Orzech) . . . . .	92

	Paĝo
I. Bunin — Morfeo (tr. Hilda Dresen) . . . . .	116
— Bonaj amikoj (tr. Helena April) . . . . .	139
Charles S. Gilmour — Joda Tincturo (tr. R. Banham) . . . . .	148
<b>3. Bibliografio:</b> 35. 47. 64. 81. 124.	
<b>4. Esperantista kroniko kaj movado:</b> 12. 24. 36. 52. 61. 64. 65. 78. 97. 114. 137. 143. 144. 155. 156.	
<b>5. Kongresoj, kunvenoj ktp.:</b> 14. 25. 26. 39. 47. 51. 55. 58. 67. 82. 88. 99. 113. 123. 142.	
<b>6. Radlo:</b> 21. 25. 51. 66. 151.	
<b>7. Redakciaj kaj Administraĵaj sciigoj, Alvokoj, Nekrologoj ktp.:</b> 10. 13. 25. 32. 35. 40. 46. 52. 53. 66. 71. 73. 82. 96. 98. 105. 112. 124. 144. 156.	
<b>8. Konstantaj rubrikoj:</b> Novaĵoj el Esperantujo: 58. 63. 97. 126. Skolta angulo: 8. 33. 50. 63. 72. 111.	

<b>Aldonoj:</b> Prof. Dr. Kazimierz Wł. Kumaniecki — Akiraĵoj de nova pola konstitucio (Nr. 1). Prof. Dr. Walery Goetel — Naturrezervajoj kaj naciaj parkoj en Pollando (Nr. 2). — Gdynia - la pola haveno (Nr. 2). Prof. Dr. Józef Reis — Ignacy Jan Paderewski - genia muzikisto kaj granda patrioto (Nr. 3). Prof. Dr. O. Bujwid — Avertoj de Marŝalo Piłsudski por la nacio (Nr. 4). Dr. Feliks Burdecki — Polaj eltrovaĵoj (Nr. 4). Dr. Rudolf Beres — Eblaĵoj de nola eksperto (Nr. 5). Dr. Edward Ralski — Plankulturado en Pollando (Nr. 5). Dr. Adam Gadomski — Kuracajzoj de kuracakvoj en Pollando (Nr. 8-9).	
--	--

**PRENUMERATA:** rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

**OGŁOSZENIA:** 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

**PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. --**

**ABONO:** jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

**ANONCOJ:** 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15 — 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

**KONTO P. K. O. NR. 406.660.**

**REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 84.**

# INTERNACIA S. O. S. BULTENO.

Speciala servo de: Radio-Club  
Espérantiste de France  
26, av. Dode de la Brunerie, Paris. 16  
Redaktas: ALGLAVE Michel en BLANC-  
MISSEYON, Nord. — Francujo.

BONAJ NOVAĴOJ el...

MARSEILLE. — Post unu jaro da silento pri esperanto, kaj dank' al la senlaca klopodo de nia amiko Bourdelon, li sukcesis decidi la komitaton de Marseille-Provence denove disradiigi siajn esp. paroladojn. La unuaj elsendoj okazis la 10 k. 24-an de nov. je 20. Dum la Foiro de Marseille, ĉe la budo de E. oni kolektis 3000 subskribojn por neti la rekomendon de la E. elsendoj en Mars.

LYON. — Denove kurso de R. Lévin estas dissendata pere de Lyon la Doua ĉiudimanĉe. Al la unua leciono respondis 200 aŭdintoj.

Aŭskultu, konigu, danku k. konfirmu aŭdadon al: Marseille Provence, esperanto fako, 32 rue Croix de Regnier, Marseille. Lyon la Doua, esperanto fako, 47 Cours Gambetta, LYON.

ITALAJ STACIOJ. — Dum la venontaj monatoj, la programoj ne plu estos senditaj, sed oni povas ĉiam peti la tekstojn de la paroladoj. Petu de la Direzione Generale per il turismo, via Vittorio Veneto, Roma, ke la esperantlingva kroniko okazu jaŭde k sabate.

E. PAROLANTOJ! A t e n t u....

La 12-an de nov. ni ricevis novaĵon laŭ kiu estis okazonta la 11-an grava E. parolado pri 'Hollywood' de J. R. Scherer el Oslo. Ni tre bedaŭras, ke la informo alvenis tro malfrue. Tamen ni varme instigas danki la stacion.

Ĉi-okaze, ni denove petas al la E. parolantoj bonvoli sendi la programojn, kiel eble plej frue.

Nuntempe mankas:

Informoj pri Kaunas. Polaj Stacioj. Lisboa. Funchal. Ljubljana, programoj por decembro el Marseille. BRNO, M. Ostrava, junuaraj programoj de preskaŭ ĉiuj stacioj.

Helpu nin: ĉiuj sendu informojn kaj aŭskultrezultatojn!

L. 21. Valence. — Wien. — Geève. — Radio Lyon.

M. 22. Valence. — M. Ostrava. — Hilversum II. — Tallinn. — Tartu. 20.00—20.15 Marselle Provence.

400 m. E. kroniko de H. Dubuisson. PRA. 3. — PRF. 5.

M. 23. Paris PTT. — Nice la Brague. — Limoges PTT. — Alpes Grenoble. — LTI. — Barcelone. — CT3AQ. — Cordoba.

21.50—22.20 Leningrad. 1293 m. „Kolhozoj de Leníngrada regiono”.

V. 25. Valence. — CT3AQ.

ĉirk 22.40 Wien. 506 m. k. ĉiuj aŭstriaĵ relajsoj. Esperanto-servo por la eksterlando.

21.50—22.20 Leningrad. 1293 m. „Politika Revuo”.

S. 26. 12.00— ? Valence. 41 m. Pri la situacio en Hispanujo.

ĉirk. 15.40 Hilversum I. Vara. 301 m. 1) La Espero, 2) E. kantoj. Hilversum II — (1875 m.) — Roma. — 2RO. — Lyon la Doua. — Barcelona.

D. 27. Kortrijk. — Lille. — Lyon La Doua. — CT3AQ. — Wallonia.

21.20—22.20 Leningrad. 1293 m. „Soveta verkisto Leonov”. Koncerto.

22.40—32.10 Hilversum II. NCRV. 1875 m. H. Wansink: „Malpacienco kaj malfido”.

L. 28. Valence. — Wien. — Sottens. — Radio Lyon. — Radio Normandie.

M. 29. kaj M. 30 — kiel ĉiumarde kaj ĉiumerkrede.

## HELPU NIN!

Anstataŭ skribi senpere al „Polskie Radio” kaj peti de ĝi kontinuadaĵo de disaŭdigado de esp. prelegoj, la landaj asocioj kaj unuopaj grupoj sendu al plej proksima pola konsulejo memorskribon kun esprimoj de bedaŭro, ke „Polskie Radio” ĉesigis esp. prelegojn, kiuj efike diskonigadis inter Viaj samlandanoj interesajn informojn pri kultura vivo, ekonomia stato, geografio, turismo de Pollujo k. s. **Ne forĉesu mencli**, ke estus nekomprenebla neglekto flanke de „Polskie Radio”, se ĝi ĝuste en la jaro de Jubilea Kongreso en Warszawa ne farus propagandon por instigi eksterlandajn esperantistojn al plej multenombra partopreno en la solena internacia festo.

**Ne prokrastu! Skribu tuj! Ni kore dankas!**

Pollanda Esperanto-Delegitaro.

„Kunmetitaj vortoj ne prezentas plen-ekzakte sumon de ideoj, kiel opinias s-o L. Dreher”. — Ĉi tiu frazo estas tute senerara laŭ lingva vidpunkto!... Tamen mi citas ĝin, por — defendi min kontraŭ riproĉo. S-ano Chmieliński riproĉas al mi, ke mia opinio ĉiuj vortoj kunmetitaj en Esp. formas nurajn vort-sumojn. Ĉu efektive mi iam aŭ ie diris tion?

Mi diris nur, ke laŭ mia opinio „scipovi” kaj „atendsopiri” resp. „sopiraten-di” konsistas el tiel similaj elementoj, ke ĝustadire ili (t. e. tiuj ĵus nomitaj kunmetaĵoj, sed ne ĉiuj kunmetaĵoj!) faras nenian novan ideon, sed sole la sumon de ambaŭ elementoj.

„Mi devas elekti ekzemplon ĝustan, senriproĉan, klaran, kaj ne ĵus strange nekompreneblan”. — Anst. „ĵus” pli taŭgas: „ĝuste”, „precize”, „speciale”, ĉar „ĵus” estas uzata de la plej bonaj esperantaj verkistoj sole kiel temp-adverbo.

„Amasoj hipnotigitaj per ĉarmo de la ludo”, — Mi preferas: hipnotitaj per la ĉarmo de la ludo, ĉar ĉi tie la sufikso — ig — estas superflua, Kion povus signifi „hipnoti”, se ne la samon kion „hipnotigi”?

„Paderewski ludis en Germanujo, ludis en Rusujo, ludis en Aŭstralio, Sud-Ameriko, kaj eĉ li atingis finojn de Afriko. — Ĉi tiu frazo pensigas („eĉ li”), kvazaŭ ne nur aliaj, sed ankaŭ Paderewski atingis „finojn de Afriko”. Tamen evidente la aŭtoro volis diri nur, ke Paderewski ludis ne nur en Germa-

nujo, Rusujo k. e. p., sed eĉ en suda Afriko. Tial „li” estas superflua kaj forstrekinda. Se la aŭtoro ne volas malhavi la pronomon „li”, li povas diri: „kaj li eĉ atingis k.t.p.”

„Suna ardo estis preskaŭ ne suferbla”. — Ĉu efektive la aŭtorino opinias, ke oni ne povis suferi pro la ardo de l' suno?... Kompreneble, la frazo devas teksti: La suna ardo estis preskaŭ netolerbla.

„La vento kaŭzita per movo de aŭtobusoj brulvundis niajn vangojn”. — Ĉar la „movo” estas la kaŭzo de l' vento, sekve la frazo devas teksti: „La vento kaŭzita de l' movo (aŭ: movado) de aŭtobusoj k.t.p.”

„Ili estas ĉirkaŭvolvitaj per felto de ventro ĝis la kapo”. — La sama simpatia aŭtorino opinias, ke ne decas opinii beduenajn ventrojn kiel sufiĉe konatajn, sekve postulantajn la artikolon „la”. Nur iliaj „kapoj” estas konsidereblaj kiel tiaj, t. e. kiel konataj, jen kial: de ventro ĝis la kapo. Kompreneble, taŭgas ambaŭ manieroj: de l' ventro ĝis la kapo, aŭ: de ventro ĝis kapo.

„Tio sama fariĝas kun haŭto de bestoj kaj homoj”. — Niaj legantoj jam ofte legis, ke mia opinio tia frazo devas teksti: tio sama fariĝas pri haŭto k.t.p.

„Post kelkaj horoj de fortojn elĉerpa vojo”. — Ĉi tie troviĝas stranga esprimo: „fortojn elĉerpa”, anst. fortojn elĉerpanta. Eventuale oni povas diri: fort-elĉerpa.

MINUSKA MANTEL (L.wów).

## HA, HA! PRO LA AMO!

Noktiĝas. Peza dormo envolvas la lacan naturon.

Lago. Grizverdaj ŝaŭmkronoj sible bruklakas kontraŭ rokon... krispiĝas... disfluas... kunpuŝiĝas obtuze!... ĉirkaŭvolvas la orfe starantan koloson per ŝaŭma fluidaĵo.

La lago de sinmortigintoj. Humida lulo de transmondaj rendevuemuloj. Fugintoj de antaŭ surteraj plezuraĵoj.

Balanciĝas la kadavroj tien... reen... Grizverdaj ŝaŭmkronoj surprimas malsekajn kisojn sur palatin fruntojn, ŝveligitajn linojn, gapajn okulojn.

Balanciĝas la kadavroj tien... reen... Ŝaŭmkronoj zumas, siblas... krispiĝas... balance portas en siaj brakoj ŝvelventrajn ŝarĝojn.

Parolas la nallipaj buŝoj. Blua lango klakas kontraŭ la palaton, gorgo eligas sonojn stertorajn. „Panon... intestoj miaj... kantis melodiojn de malsato”... „Panon”... blua lango klakas kontraŭ palaton... „intestoj miaj... miaj... mi...”

„Ha! Ha! Sinjoro Panow!” Intestoj liaj kantis melodiojn de l' malsato”... „ha! ha!” brue eĉas la kunnaĝantoj.

„Mi volis vidi la mondon! Salti trans la globon, venki maron, gliti trans urbojn gigantajn, vidi la bluan Adriatikon... la sunon de Italio. Ĉu vi aŭdas la susuron de la banknotoj... jen... rigardu... mil... dekmil... centmil... jen la diabla allogilo... ha! ha! la ciferoj sufokas min... mi... volis venki ilin... jes, la ferajn dentojn de la kaso. Jen la tran-

ĉa lumo blindigis min... ho. policanoj... ili volis kapti min... kiam la mara kolo-  
so prenis min en siajn brakojn... haa!  
la moonoo! haa!" — grakas Sinjoro De-  
fraŭdow.

„Ha! Ha; Ili volis kapti lin... hul, li  
volis venki la mondon... bluĉielan Ita-  
lion... Ha! Nun li gaje naĝas kun ni,  
Sinjoro Defraŭdow”.

„Brown Boveri... Hermes-Banko... kur-  
zo saltanta al kapturita alteco... brue fa-  
lanta en senliman nulecon... ha! jen la  
paperoj sufokantaj mian gorĝon, premas  
min... disfrakas min la borso. Elŝiris  
miajn intestojn, formanĝis mian koron,  
elsuĉis mian cerbon. Detruis, venenigis  
min, forbalais mian familion. Filinoj  
surstrate... edzino ftiziginta"! — ĝemas  
Sinjoro Monetow, frapas sian ventron,  
plenan de akvo... klaktuŝas sian kalva-  
jon... haraktas gaje per la piedoj... pe-  
toleme turnas sian dorson.

„Ha! ha! Elŝiris liajn intestojn, for-  
manĝis lian koron, elsuĉis lian cerbon!  
Brown Boveri... Hermes-Banko, kurzo  
saltanta, refaliĝanta sur kapojn — Ha!  
ha! Sinjoro Monetow!”. La noktaj ren-  
devuantoj oretranĉe priblekas mokon  
kaj mizeron.

Balanciĝas la kadavroj tien... reen...  
Grizverdaj ŝaŭmkronoj ekpetolas, starle-  
viĝas... kunmiksiĝas... kirle turnas la  
korpojn.

Hopla! Ili tuŝas rondaĵojn, molaĵojn.  
Manoj palpsentas ŝin, la blondbuklan  
novalvenintinon.

„Mia nomo estas Vera Amowska, 18-  
jara”, ridetanoncas pala buŝo.

Vera Amowska, 18-jara, profunde ri-  
verencas Defraŭdow, Panow, Monetow,

„Vera Amowska, 18-jara” reĉhas la  
ŝaŭmkronoj.

Bankisto Monetow karesas sian kal-  
von, frapas sian ventregon, plenan de  
akvo, okulumas al bela pala Vera Amow-  
ska 18-jara.

„Estis iam... estis ie...” kantis ŝi. „Es-  
tis iam... estis ie...” ripetis la sublaguloj.

Feliĉa mi estis, feliĉega. Blanka ve-  
sto sur mia korpo, ruĝa rozo en mia ma-  
neto. Rozo, ruĝa kaj ebrige bonodora.  
Ho, mia unua balo! Unua mia amuzo.  
Britaj perloj plektiĝis cirkaŭ mia cigno  
blanka kolo. Buŝo mia tremete atendis  
kisetajn, ĉarmajn amflustrojn.

Brilis la kandeloj, en la balsalonego.  
Jetis misterajn makulojn sur la riĉe skul-  
ptitan plafono. Sajnis al mi, ke la gips-  
anĝelo en la dekstra murangulo, peto-  
le levas sian fingron.

La salono trempiĝis en ebrio, rido,  
varmego. Parfumodoro dolĉe svenetigis.

Tie staris li, Francisko Romano. Mia  
destino. Valso ludadis, levis la animon  
alten, al paradizaj sferoj.

Francisko! La floro, rozeto, tremete  
kliniĝis, la kalikoj volupte ensorbis vian  
ĉeeston.

De malproksime... ie... tra la densa ne-  
bulo aŭdiĝis dolĉa sekreta flustro... Tan-  
go... Tango Argentino.

Mi plektis miajn lilioblankajn brakojn  
ĉirkaŭ lian muskolan kolon... ni dancis  
Tangon... Tangon Argentinon.

Gipsa anĝelo, en la maldekstra muran-  
gulo, ĉu eble en la d... d... dekstra? Ha!  
ĉampanon sorbas miaj kisŝveligitaj fe-  
braj lipoj. La anĝelo en la dekstra mu...  
mu... murangulo minace levas sian ŝto-  
nan fingron... ha! ha! mia glaso laŭte  
ektintas sur ĝia nazo... hu... hup... hup...  
Ha! ha! pro la amo.

La nazo estas... hup... for... nun la dua  
ĉampanglaso... hup... ankaŭ la fingro ne  
plu minacas... hopla... hup... ĉion distre-  
tis jam la piedoj de la dancantoj.

Tra... ta... ta... ta... marŝas muziknotoj  
en mia dekstra cerboparto... subite la  
„fis”-sono ekkriaĉas... tiu ĉi sono tran-  
ĉas mian haŭton. ŝiras mian robon, mor-  
das miaj linojn. Gape malfermante miajn  
okulojn, mi vidas ies buŝon, suĉe orem-  
dantan al la mia.

Gipsanĝelo sennaza, senfingra ne plu  
minacas, sed la „fis”-sono petoldancas  
sur la rando de la ĉampanglaso. Mi vo-  
las forŝiri ĝin... ĝian kapon... hup... la  
bu... buk... bukloj sur vira kapo interple-  
ktiĝas kun miaj karesantaj fingroj...  
Tango Argentino... tra... tra... tra... Vera  
Amowska mi estas, 18-jara, sur la unua  
halo. Ha! ha! Mi kuŝas sur vato, jes, la  
gipsanĝelo preparis ĝin. Mi estas en la  
ĉ... ĉ... ĉielo... sed, ho, hup... k... k... kial  
sur kuseno? Lito? Ne... jes... ne... hup...  
mi promesis al panjo... ne! Mi volas la  
gipsanĝelon. Ne! Lasu min! Ridu, la sen-  
naza, senfingra gi... gin... gipsanĝelo!  
Tango Argentino.

Kial kuŝas ĉi tie mono, kaj kie estas  
Francisko Romano? Jes, la mono por la  
gipsanĝelo, mi riparigu ĝian fingron,  
ĝian flarilon. Aŭ ne? Mia kapo... hup...  
ka... po...! Kion signifas la letero por  
la dolĉa kunesto kun bela katino?”

„Kaj hejme mi volis demandi patri-  
non”. „Ha! ha! Hejme ŝi volis demandi

la patrinon..." kvikis la aŭskultantoj en la lago... „demandis la patrinon”.

Kial ne plu malfermiĝis la patriĉa pordo? Kial ne plu kombis miajn orajn harojn la delikata patrina mano? Kial oni pelis min tra la vilaĝo, ĵetis sur min ŝtonojn, kotpecojn?

Klak... bruas la pluvo... hu... hu... ploras la vento. Francisko... Franc...

Ĉiam mi estos la via... mi amas vin. Kial pelas la vento tiel antaŭen? Ĉiam mi estos la via... mi amas vin. Prenu min al vi. Mi volas ĉampanon... ne ludu valson... kapelestro... ludu tangon... Tangon Argentinon. Estas tiel malvarme... kovru min per via korpo, Francisko. Mi

amas vin. La ondoj tiel bruas... patriĉo... malfermu pordon. Tenu min, Francisko. Ni dancu Tangon Argentinon. Kapelestro ludu! Gipsanĝelo, ne minacu! Pardonu al mi, patriĉo! Mi amas vin, mi amas vin Francisko... mi, Vera Amowska, 18-jara sur la unua baĉo.

\* \* \*

Mi mortis pro la amo! Pro la amo mi mortis.

\* \* \*

Ha! Ha! Pro la amo! Rido malica tranĉas la surfacon de la lago. Balanciĝas la kadavroj tien... reen... Ondoj krispiĝas la palaj droniĝintoj petolridas... Ha! ha! morti pro amo... ha! pro la amo morti?

HENRYK GIELB.

## *Nordaj Gandoj kaj Popoloj*

(Fragmento\*)

Mi saltis en vagonon, sed mi restis en la pordo. Mi volis profiti ankoraŭ kelkajn minutojn por adiaŭi la akompanantajn min tartuanojn.

La vagonaro ekmoviĝis. — mi svingis per tuketo al la ĉiam malproksimiĝantaj konatuloj. — La malluma nokto jam estis englutinta la vagonaron, kiam mi deturnis la okulojn for de la direkto, kie restis miaj akompanintoj. La vagonar-pordo ankoraŭ estis malfermita, kaj ni veturis jam plenforte. Nur nun mi turnis la atenton, ke estas danĝere stari ĉe la malfermita pordo. Sed mi ne estis sola; rigardante malantaŭen, en la mallumecon, staris knabino ĉirkaŭ 18-jara. Mi ekmemoris, ke ŝin akompanis iu sinjorino, kiu persiste klarigadis al ŝi ion en la estona lingvo.

La sinjorino restis sur la perono, kaj mia najbarino ĉiam staris ĉe la malfermita pordo de la kuranta vagonaro.

Mi alparolis ŝin esperante, poste germane, sed ĉio sen efiko — ŝi montris signojn de nekompreno. Nur ruse mi sukcesis klarigi al ŝi, ke oni devas fermi la pordon, ĉar povas okazi akcidento.

„Pli bone se estus okazinta” — respondis la knabino, per malĝoja, preskaŭ aŭdebla voĉo, kvazaŭ ŝi estus rezigninta pri la plua vivo.

Tiam mi ne plu atendis: decide mi kaptis la pordon kaj ŝin fermis, puŝ-entirante en la vagonon la misteran junulinon.

Mi demandis pri la kaŭzo de tiu rezignacio, sed ŝi apenaŭ sukcesis rakonti,

ke la saman tagon ŝi estis forlasinta la hospitalon, kaj nun ŝi veturas al Pärnu — kiam alvenis konduktoro kaj ekpostulis la biletojn.

Ŝi eniris en kupeon por preni sian bileteton kaj la konduktoro ŝin sekvis.

Pasis kelkaj minutoj, la konduktoro iris for, sed ŝi ne revenis.

Ekinteresita mi malfermis tiun kupeon, sed tuj mi volis retiriĝi; pensante, ke ŝi estas nur por virinoj.

Sur unu benko sidis nia malĝoja konatolino, kaj vid-al-vido, kovrita per mantelo, kuŝis alia ino, vidigante nur belegan, kiel artiste skulptitan piedeton...

En la sama momento ŝi forigis ioma la mantelon de la vizaĝo, kaj brilanta okulparo „mezuris” min de l' piedoj ĝis la kapo...

„Pardonu”, mi diris ĝentile, ĉi-tie estas nur por virinoj?

Sed anstataŭ ekaŭdi respondon de tiu kun kiu mi jam estis parolinta, ekparolis la kuŝantino germanlingve, ke mi povas okupi lokon.

Mi volis klarigi, ke mi jam estas okupinta lokon en alia kupeo, sed ŝi daŭre parolis, montrante al mi lokon apud si...

„S-ro, ŝi diris, ni povas paroli libere, nia najbarino ne komprenas nin. Ŝi venis en la kupeon — daŭrigis la kuŝantino — kaj diris, ke ŝu alparolis ŝin germanlingve, ŝi priskribis la personon — estas ĝuste vi”...

Mi ne scias kion respondi; jen tiu nekonnata juna knabino, en kuŝanta libera pozo, ekzamenas min, kiel profesoro.

Mi nepre volis ekscii, kiu estas ŝi?

Dume mi tute forgesis, ke miaj valizoj restis en alia kupeo sen protekto.

„Cu vi, fratilino, ankaŭ veturas al Pärnu? eksidinte mi demandis.

„Jes”.

„Cu ankaŭ vi reveturas de malsanulejo”? mi daŭrigis.

Tiun fojon ŝi neis, klarigante al mi, ke nian kunvojaĝanton ŝi vidas nun la unuan fojon.

Nia malĝoja najbarino, aŭdante la nekomprenoblan por si interparolon, prenis diskrete sian malgrandan pakajeton kaj lasis nin solaj...

Nun, ju pli multe mi rigardis mian novan konatulinon, des pli forte ŝi plaĉis al mi...

Ni estis nun sidantaj unu apud la alia, ni estis jam multe parolintaj, unu observis multe la alian, sed ankoraŭ ĉiam fremdaj, tute anonimaj...

— Kvazaŭ ĉasisto, kiam li ekvidas belan birdeton, ne nur li neniam ĉasas, sed li eĉ de l' loko ne moviĝas por ne fortimiĝi la belan aĉaĵon, kiun li rigardas sopire...

Mi ne kuraĝis demandi, kiu estas la ĉarma infanino, kiu tiom saĝe kaj inteligente parolas. — prefere mi provokis ŝin al demandoj.

Ĉion mi respondis elĉerpige, pruvante samtempe per atestoj kaj legitimiloj...

La „ekzamenon” mi sukcesis bone; mia najbarino evidentigis nekaŝitan kontenton, — fine ŝi malfermis la buŝeton, — kaj ĝoje ridetante ŝi vokis: „Jurist, Jurist, kia hazardo, kia bona signo”...

Ŝiaj etaj manoj rapide malfermis malgrandan valizeton, prenante legitimilon.

„Legu” — ŝi diris —

„Tanja... studentino de la jura fakultato, Universitato en...”...

Mi ne scias kial, sed kiam mia penso-aparato reekfunkciis, mi estis tenanta Tanjan en la brakoj. Ĉirkaŭ mia kolo estis kunplektitaj ŝiaj etaj dolĉaj manoj, kaj sur miaj lipoj mi sentis la aromajn, ĉerizo-kolorajn lipetojn de Tanja...

Nun, kiam mi sidas hejme ĉe la skribotablo kaj verkas la ĉi-subajn liniojn.

mi pensas: kiel okazis, ke dek minutoj sufiĉis por kroni nian konatiĝon per kiso, kies dolĉecon mi sentas ankoraŭ.

— La vojo de Tartu al Valga, la landlimo de Estonio, pasis kiel unu longa, neforgesebla kiso..

En mia notlibro mi trovis noster jenan frazon: „Tanja, dolĉa knabino. inteligenta, matura kaj konscio-plena homo. Vagonaro Tallinn — Riga, 24, 15 — 2,15, la 13. de septembro 1935”. kaj sekvas adreso, skribita per la mano de Tanja...

Du horoj, sed kiom rapide ili flugis for...

Ni devis disiĝi en Valga. La vagonaro al Pärnu foriris la unua. Ni adiaŭis unu la alian kvazaŭ sin amantaj frato kun fratino.

Kiam la vagonaro ekruliĝis, forportante Tanjan, miaj okuloj sekvis ŝin longe, longe...

Ĉe la fenestro de unu vagono mi rimarkis tiun, kiu estis la hazarda ligilo inter ni. Ŝi staris sola, sed ne plu malĝoja; ŝi rigardis alterne, jen min, jen la svingantan manon de Tanja, kvazaŭ ŝi dezirus diri: „mi ĝojas per via ĝojo, mi plu volas vivi”!!!

En ĵus ricevita letero, Tanja skribas: „...ja es ist sonderbar das Leben. Ich habe Dich nur 2 Stunden gesehen, und doch habe ich Dir so viel, so sehr viel zu sagen”...

„...es ist ganz wahr, wie Du sagtest, wir müssen uns früher gut gekannt haben”...

Kaj se iu el Vi Karaj Gelegantoj, dubas, ke ni estis nin konintaj jam antaŭe, akceptu kiel aksiomon, ke Tanja kaj mi bone ekkomprenis unu la alian reciproke...

La konatiĝo ĉe unuj daŭras jarojn, ĉe la aliaj ĝi daŭras monatojn, por ni sufiĉis minutoj...

Tanja estas nordlanda virino.

\*1 Tiu-ĉi fragmento estas parto de 48-paĝa manuskripto s. t. „Nordaj landoj kaj popoloj” — vojaĝraportoj pri Latvio, Estonio, Finnlando kaj Svedujo.

H. G.

### UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto” uskutecznić można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29. co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

ABONU MEM KAJ VARBU POR „POLA ESPERANTISTO”! VI LEGOS ĈIAM INTERESAJN NOVAJOJN PRI LA LANDO DE JUBILEA KONGRESO!

## POLLANDA KRONIKO

**KRAKÓW.** — La 17-an de novembro okazis ordinara Ĝenerala Kunveno de la „Societo Esperanto”. Oni elektis novan estraron por la venonta jaro, konsistantan el jenaj personoj: prof. Dro O. Bujwid, Dro L. Rosenstock, Dro L. Dreher, K. Bromek, J. Naubergowa, N. Dattnerowa, H. Aprilówna, L. Srebrna kaj H. Klingerówna. De post multaj jaroj je la unua fojo en la Ĝenerala Kunveno ne partoprenis nia prezidanto prof. Bujwid, ĉar la 20-an de oktobro li forveturis Brazilon.

La novelektita estraro vigle eklaboris, organizinte kurson, kiun partoprenas diligente 40 personoj, plejparte junuloj. La kurson gvidas s-ano Dro L. Dreher laŭ propra, tre bona metodo. Prepariĝas ciklo de interesaj prelegoj, kiuj okazados regule dum semajnaj kunvenoj de la societanoj.

En kunlaboro kun „Pola Esp. Klubo” nia Societo aranĝis Festvesperon honore al la Majstro, okazintan la 15-an de decembro en la belega kino-salono de la Industria Muzeo. La riĉan programon, kiun konsistigis deklamoj, kantoj kaj muzikludo, plenumis unuarangaj geartistoj. La salono estis plenplena. Speciale oni aplaudis f-inon Irena Szczepańska, kiu recitis propran poeziaĵon s. t. „Verda Printempo”.

**LWÓW.** — Alproksimiĝas la vintro, kaj per tio niaj klopodoj, ekvigligi nian movadon. Bela nova klubejo troviĝas ĉe str. Senatorska 8, Instytut Muzyczny kaj estas disponebla marde kaj sabate de 19-21' horo. S-ro Józef Toczyski, prezentis sian valoran kunlaboron, estrante la gravajn antaŭlaborojn por la mondkongreso subtenita de aro da helpemaj geanoj. Je specialaj invitkartoj dissenditaj, kunvenis pli ol 50 geanoj, kiujn nia Klubprezidanto Dro J. Fels kore salutis. Oni diskutis pri aranĝo de specialaj sekcioj, plenumantaj jenajn taskojn: Preparo de propaganda materialo, enlernejoj prelegoj kaj kursoj, gazetartikoloj en „Chwila”, (redaktoro Szymon Szpund) aranĝo de propagandaj radioparoladoj kaj Esperanto-kabaredo, prezentita de lokaj artistoj de Polskie Radio Lwów (Programa Sekretario S-ro Jerzy Tępa) sub la gvido de la fama Radio-reĝisoro Mgr. Budzyński.

Dro Karol Klein, nia radioparolanto kaj s-ro Józef Toczyski intertraktas kun la Direkcio de la Radiostacio. Kurson

gvidas en la Societo Mgr. Natalia Kleinowa. (Rap. Minuška Mantel).

**WARSZAWA.** — La Esp. Rondo „Konkordo” nunjare rekomencis sian agadon iom malpli frue. Sed — kvazaŭ rekompence — pli intense. Kaj ree, laŭ iama tradicio „Konkordo” okupas unu el plej aktivaj lokoj inter la Varsovia societaro. Post la inaŭgura „Viva Gazeto” Nro 1. (la numeroj estos daŭrigataj kaj la kunlaborantaro ĉiam kreskos) la 26-an de novembro „Konkordo” dediĉis — okaze de la 15-jara datreveno de morto de Adam Zakrzewski kunfondinto de „Konkordo” kaj unu el plej mondfamaj esp. merituloj — vesperon honore al Lia memoro.

Jam longe la varsoviaj samideanoj ne memoris tian vesperon. La malnovaj pioniroj ree ekaperis. Unu el ili, kun larmoj en la okuloj speciale aliris por danki pro la grandega feliĉo, liverita al lia animo. Ho, kiel longe li jam ne troviĝis en tia vere esperanta familio! Se eĉ li — laŭ liaj vortoj — iam venis al iu societo, li ankaŭ ne aŭdis esperantajn sonojn, ĉar oni paroladis tie nur pole. Kaj nun — dum tuta vespero — ekskluzive nia lingvo! Veraj larmoj montriĝis en liaj okuloj. Prezidis Dro Antoni Czubyński L. K. Pri vivo, ago kaj meritoj de Zakrzewski parolis Edvardo Wiesenfeld L. K. poste f-ino Szenfeld legis fragmenton el la „Historio” de Z., fine f-ino Dro Muszkatblat belegis deklamis. Inspirita de la situacio ekparolis ankaŭ la jam tre longe ne montriĝinta s-ro Adolfo Oberrotman.

La vespero faris fortegan impreson je la ĉeestantoj, inter kiuj — kiel citite — troviĝis interalie Lejzerowicz LK, red. Pisarski-Woydakowski (membro de la red. komitato de P.A.T. — Pola Agentejo Telegrafa), s-ro Gielb k. a.

La venonta kunveno estos dediĉita al „Viva Gazeto” Nr. 2. La 15. XII. 1936. — kun la partopreno de la ceteraj varsoviaj societoj — okazos la tradicia „Tago de l' Libro”.

**WILNO.** — Post kutima somera interrompo Turista Esperantista Rondo (TERO) ĉe Z. T. K. ree eklaboris por la disvastigo de Esperanto en Vilno. Laste okazis en ejo de TERO granda propaganda vespero. Antaŭ sufiĉe multenombra ĉeestantaro (ĉirkaŭ 100 p.) s-ano S. Sik inaŭguris la Vesperon kaj je honore de nia Majstro estis ludata „La Espero”.

S-ano Sik tuŝis en sia parolado laste okazintajn kongresojn en Vieno kaj Krakovo, finante per alvoko al pli vigla laboro por Esperanto precipe en la jubilea jaro de nia movado.

La preleginto informis ankaŭ pri la preparaj laboroj kaj programo de la 29-a en Varsovio, al kiu li alvokis amase partopreni; kiel rezulto de tiu propaganda

vespero estas maifernita komenca kurso sub la gvido de Dro Perelman el Lomza (kiu loĝas nuntempe en Vilno). Ĉe TERO funkcias ankaŭ supera kurso sub gvidado de Dro A. Gurwicz. Danke al TERO funkcias komencaj kursoj en la lernejo „Szul-Kult” (gvid. de s-ano B. Subotnik) kaj en la komerclernejo de J. Gezundheit (gvid. de Dro A. Gurwicz).

### PRI PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO.

Literatura Mondo informas ĉiujn aĉetintojn de la unua eldono, ke la dua eldono estas ĵus prespretigita. Ĝi estos ĉirkaŭ 100. paĝojn pli granda, ol la unua kaj la eldonejo ŝanĝos por ĉiu la unuan eldonon je la dua. La aĉetintoj, se ili hazarde ne ricevis la necesajn informojn antaŭ la 1-a de novembro povas ĝin havigi de la eldonejo aŭ de la firmo, kiu liveris al ili la libron. Kiuj ne deziras ŝanĝi, rajtas aĉeti la duan eldonon por la duona prezo. *Literatura Mondo.*

### ALVOKO AL KUNLABORADO.

La Redakcio petas insiste:

a) literaturemajn legantojn pri kunlaborado per regula alsendado de originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj.

b) propagandistojn pri verkado de artikoloj koncernantaj la problemojn de esperantista movado,

c) estrarojn de societoj apartenantaj al P. E. D. pri regula sendado de raportoj kaj koncizaj notoj pri la agado de siaj grupoj. La enhavo de la komunikadoj estu vere esenca. Oni evitu troadon, panegiraĵojn, personajn reklamojn k. s.

Se vi deziras, ke „Pola Esperantisto” estu interesa legaĵo por ĉiuj kaj inde reprezentu la landon de Jubilea Kongreso, provizu ĝin per leginda materialo!

### OBNIŜKA ABONAMENTU!

Kaŭdy abonujący na rok 1937 miesięcznik „Pola Esperantisto” wpłaca do dnia 31 grudnia 1936

t y l k o z ł 6.50.

Po tym terminie abonament wynosi z ł 8.— rocznie.

**Korzystajcie ze zniżki!**

Równocześnie komunikujemy, iż zalegającym z wpłatą abonamentu za rok 1936 wstrzymujemy wysyłkę miesięcznika z dniem 1' stycznia 1937. Prosimy więc uprzejmie o wyrównanie zaległości.

### ESPERANTO EN KIMRUJO.

Ĝis nun Esperanto ne bone progresis en Kimrujo. Por propagandi la lingvon kaj la movadon en la lando kelkaj fervoraj samideanoj instigis la komitaton de la „National Eisteddfod of Wales”—tre grava literatura kaj muzika festo—enhavigi en la programon por la venonta jaro (1937) Esperantan konkurson.

Do, por la plej inda traktato pri „Esperanto kiel komprenigilo inter la nacioj” oni donos premion de £ 5 (100 ŝilingoj).

Samideanoj el la diversaj landoj! Montru ke Esperanto estas utila kaj necesa. Verku traktaton kaj sendu ĝin ĝustatempe. Notu bone la regulojn. La numero de la konkurso estas 30.

Temo: „Esperanto kiel komprenigilo inter la nacioj.”

Ĉiu verkaĵo devas esti manskribita, maŝinskribita aŭ presita sur unu flanko de la papero. Uzu paperon sufiĉe grandan (ĉirkaŭ 30 c. m. × 20 c. m.) kaj kunligu la foliojn. Ĉiu verkaĵo afrankita kaj registrita, devas esti ĉe la sekretario inter aprilo 22-a kaj majo 1-a 1937.

Ĉiu konkursanto devas subskribi sian verkaĵon per pseŭdonimo kaj sendi sian nomon kaj adreson en sigelita koverto sur kiu montriĝas la nomo kaj numero de la konkurso, nome „Esperanta Traktato. No. 30.” kune kun la pseŭdonimo de la konkursanto.

Nomo kaj adreso de la sekretario:

**Sinjoro J. Rhys Lewis,**  
Eisteddfod Office,  
MACHYNLLETH, Mont.,  
Wales. Granda Britujo.

Al niaj abonantoj, legantoj kaj amikoj ni sendas tre korajn dezirojn ĝoje pasigi la **Kristnasko-festotagojn** kaj ĉion plej bonan en la **Nova 1937. Jaro.**

**La Redakcio kaj Administracio de Pola Esperantisto.**

